ESPERANTO NOORD-NEDERLAND INVITAS VIN!

Zamenhofa festo

Festa kaj luksa tetrinkado
sabaton, la 15an de decembro 2018,
de la 13.00 ĝis la 17.00 h

Ĉe tablo malplena babilo ne fluas!

(*Zamenhofa proverbo)*

Ni invitas vin partopreni tiun ĉi aranĝon. Ĉiu kunportu ion por frande manĝeti!

Ĉu vi kunportos kukojn, etajn sandviĉojn, ĉokoladajn pralinojn aŭ spicajn tortetojn?
Ni prizorgas bongustan teon (kaj kafon!).
La sabata kunveno okazos en la ejo: W. Dreesstraat 1, 9728 SW Groningen.



Nia gasto estos Geomar Martínez Pérez, kubano kiu nuntempe loĝas en Germanio. Ineke konatiĝis kun li antaŭ kelkaj jaroj kaj poste renkontis lin en Kubo!

Li promesis kunporti sian gitaron!

Geomar tranoktos ĉe Ineke kaj dum la dimanĉo ŝi montros al li la urbon Groningen.
Vi estas bonvena kunpromeni!

Amikajn salutojn, Ineke Emmelkamp, prezidanto Esperanto Noord-Nederland.

Ĉu vi venos? Kion vi planas kunporti por frandi? Anoncu ĉe Ineke Emmelkamp,
tel. +31 505775954 aŭ +31 6 36087071 rete: lekanteto@planet.nl

La ejo (W. Dreesstraat 1) estas atingebla de la NS-stacio Groningen per buso (linio 10, direkto Hoornsemeer, haltejo W. Dreesstraat). Parki aŭton aŭ biciklon eblas antaŭ la ejo.